

# Momenton!

n° 11

1-a sesmonato de 2008

oficiala organo de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo)

## La reapero de la revuo!

Konkurso BEJO-Ataŝeo refoje okazas!

Intervjuo: JoMo!

Foto-mozaiko de nia junularo!

Kore lanĉas novan albumon.

Foto-raporto pri la vojaĝo de BEJO-Ataŝeo

## Redaktejo

Bruno Longo – *redaktis*  
Lucas Vignoli Reis – *ĉef-redaktisto*  
Rafael H. Zerbetto – *help-redaktisto*  
Renata Ventura – *redaktis*

## Kompostado

Lucas Vignoli Reis – *ĉef-tipografisto*  
Skipto de Preface Design  
– *ĝenerala konsilado pri dezajno*

## Instigado

Felipe Queiroz

## Ankaŭ kunlaboris

Rogener Pavinski  
Hilbernon Almeida  
Leandro Souza  
Jean-Marc LeQuerc  
Rafael Lins

(...) Tamen iomete surprizis min la spirita (ne nur spiritisma) etoso de la kongreso, kiu estas malpli kutima en Eŭropo, sed mi pensas, (...)



# Ĉi-revue

- Noto de la redaktejo** Lucas Vignoli Reis *La revuo reaperas* **4**
- Alvoko** Hilbernon Almeida *43-a BKE kaj 28-a BEJK* **5**
- Kolumnon** Lucas Vignoli Reis *Esperanto, la unua kultura movado* **6**
- Intervjuo** Renata Ventura *JoMo* **8**
- Poeziaĵo** Rafael Lins **11**
- Poeziaĵo** Carlos Drummond de Andrade *Man-ĉe-mane* **12**
- Foto-albumo** Pluraj kunlaborantoj *Foto-mozaiko* **12**
- Recenzo** Rogener Pavinski *Tielas Viv'* **15**
- Alvoko** *BEJO-Ataŝeo relanĉita, partoprenu ĉi-jare* **16**
- Foto-albumo** Lucas Vignoli Reis *Vojaĝeroj* **16**

### La revuo reaperas

Finfine, post longa periodo sen ĝi, nia revuo reaperas. Kaj por kompensi nian mankon ĝis nun, ni donas la revuon ankaŭ al ĉiuj kiuj ne ricevis dum la malfacila tempo, kaj mi klopodis prepari speciale buntan kaj kvalitan revuon por ĉi-okazo. Mi esperas, ke la rezulto plaĉos al vi. Estas granda honoro por mi la tasko. Ekde nun ĝi aperos regule (almenaŭ du-foje jare), kaj surpapere.

Unue, mi min prezentu, mia nomo estas Lucas, mi studas fizikon kaj interalie multe interesiĝas pri tipografio, kaj pro tio, iom post iom mi revis tipografiumi Momenton! Ĉar temas pri bonega ŝanco ekhavi sperton en tiu ĉi kampo. Mi jam informas ke mi sekvas la internacian tipografian stilon de dezajno, ankaŭ konata kiel la svisa stilo, guglumu tion, sendu viajn kritikojn.

Sed, pro manko de aliaj volontuloj, ĉi-foje mi ankaŭ prenis la taskon redakti ĝin, kaj tio tute fremdas al mi, kaj tio venis en treege aktiva epoko de mia vivo. Pro tiu ĉi manko de sperto, la pretigo daŭris multe pli ol mi planis, pardonon al vi, kara leganto. Krom tio, mi ne sukcesis ekhavi multe da materialo de multaj personoj, do, ĉi-numero estas iom diktatora numero, multajn aferojn mi mem verkaĉis. Bonŝance, Rafael Zerbetto iĝos nia redaktoro ekde la venonta numero.

Sed, per ĉi-eldono mi volas montri la spacon kiun la junularo havas por esprimi sin.

Vi, uzu ĉi tiun spacon, sendu artikolojn, foto-albumetojn, komentitajn fotojn, etan kronikon, kolumnon, komenton pri la lasta revuo kaj ĝiaj artikoloj, leteron, alvokojn, recenzojn, raporteton pri via sperto en iu evento, pensojn pri la vivo, klaĉaĵoj. Sendu al ni, bonvole, ni petas genuflekse.

Mi esperas ke la revuo plenumu sian rolon, kaj ke oni sentos sin instigata ĝin partopreni. Mi profitos ĉi-spacon ankaŭ por, iom post iom kundividi spertojn pri mia vojaĝo, kiel BEJO-Ataŝeo, tiamaniere ke, poste ĉiuj prisoifos partopreni ĝin aŭ donaci monon por la venontaj viktimoj de la konkurso.

Mi volas danki al tiuj kiuj fidis min, kaj al la pasinta skipo, speciale al Rogenerm ilia laboro estis tre bonkvalita.

Ni frenezumu kune kaj kurbodomu kune.

Pugkisojn,

Lucas Vignoli Reis  
***momenton@gmail.com***  
*Ĉef-redaktoro, ĉef-tipografiisto  
kaj ĉef-diktatoro de Momenton!*

### 43-a BKE kaj 28-a BEJK

### Infano: kia grundo!

Brazila Movado Esperanta centjariĝis pasintjare kaj brile ni festis tiun momenton en la mirinda Rio de Janeiro. Neforgesebla histori-marko... La vivo tamen ne stagnas kaj ni, brazilaj esperantistoj, tre oportune celebros novan mirindan momenton. Pli viglan kaj riĉoportan etapon de nia historio inaŭguros la 43-a BKE okazigonta en ankaŭ mirinda brazila Esperanto-lando: Fortaleza. Temas pri la unua nacia aranĝo de la dua jarcento de nia kara movado.

Por inaŭguri tiun novan etapon, ĉifoje ni tre aŭspicie kunigos la du ekstremajn limojn de aĝoj de la homa vivodaŭro. Pli klare, ni invitos vin pridiskuti kion ni faras por flegi la komenciĝantan vivon de niaj infanoj, kaj samtempe ni omaĝos nian majstron eternan kaj ĉiame junan Paulo Amorim Cardoso, je jam sia 85-a jaro de vivo. “Infano: kia grundo”, jen la propono sur kiu baziĝas la ĝenerala temo de nia Kongreso.

Ĉiu infano havas rajton je unu familio, bona sanstato, sekureco, plena disvolviĝo de siaj kapabloj kaj edukeco, interalie. Ni bedaŭrinde scias, kiel tiuj universalaj rajtoj estas for de multaj el niaj brazilaj infanoj. Kiel do kontribui por atingi la solvojn de la problemoj, kiuj suferigas niajn infanojn kaj adoleskantojn? Kiel Esperanto

povas helpi? Ni pensas, ke Esperanto multe havas por diri tiurilate kaj, ke ĝi devas flori ankaŭ en tiu medio.

La invito do kadre de la temo koncernas al ni ĉiuj, esperantistoj aŭ ne. Ni el la LKK, la organizantoj de la aranĝo, vigle prenis sur sin la defion krei la kondiĉojn necesajn al bunta kaj riĉa diskutado pri tiu temo, laŭ diversaj vidpunktoj kaj etosoj: el, ĉu dezirate, akademia, kiel en prelego de dano, prezidanto de Internacia Kosmologia Asocio, kiu jam konfirmis sian ĉeeston; ĝis kvazaŭ infaneca, kiel en diversaj momentoj kongresaj, kiam “plenkreskaj infanoj” estos invitataj, dum momento, rememori sian (kelkfoje forgesitan) Infanaĝon. Certe la varia programo de nia kongreso trafos la plej diversajn kaj postulemajn dezirojn kaj esperojn. Ni esperas, ke ankaŭ vi venu kaj kontribuu per siaj spertoj kaj ideoj.

Fortalezo delonge ĝuas la rekonon nacian de sia beleco kaj gastemo. Kongresanoj denove (jes, denove!) ĝuos mildan varmecon, promenadon kun novaj amikoj ĉe la maro, belajn plaĝajn pejzaĝojn, neperdeblajn balojn kaj tiel plu, nur enuo ne estos permesata. Vizitu do Cearaon em julio! Ni ĉiuj deziregas ĉirkaŭbraki vin alian fojon!

Salute,

Hilbernon Almeida  
*Unua sekretario de 43-a BKE  
Fortaleza-CE*



## Esperanto, la unua kultura movado

*Trans raŭmismom kaj finvenkismom. La esenco de Esperanto laŭ mi. La unua plano rekonstrui parton de kulturo. La grandioza defio nuntempa: havi kuraĝon pace kaj arte verki nian kulturon.*

Lucas Vignoli Reis

Esperanto, nia komuna lingvo, estas la unua pure\* kultura movado. Temas pri kunkonstruo konscia de kulturo, la homo plananta sian kulturon, unuafoje, kaj konstruo komuna de unu el la bazoj de kulturo: la lingvo, per kiu la homo interŝanĝas ideojn, simbolojn kaj eĉ emocion.

Antaŭ tio, klopodoj ŝanĝi la homan vivon estis farataj sur aliaj bazoj, sur ideologioj, filozofioj, estro-politikaj agoj kaj religioj, tiuj estis la ŝanĝiloj uzataj. Kaj ili ankoraŭ estas uzataj, kaj kaŭzas efikon. Tamen, ili havas grandegajn malavantaĝojn, nome, ĉefe, la nekoheron inter la celoj kaj la rezultoj. Komunismo estas bona ekzemplo de ideologio, ĝi surpapere belegas, estas nobla idealo plena je sincera zorgemo pri la proksimulo, sed iu ajn ideologio por funkcii bone devas esti unuanima inter la animoj de iu socio. Kaj sperto atestas, tio ne okazas nature, neniu ideologio iĝas dividata de ĉiuj homoj de socio nature, ĉu vi memoras pri ekzemplo? Se oni volas ke tuta socio dividu saman ideologion, oni devas altrudi ĝin. Pro tio, Marx kaj Lenin kaj aliaj defendis la laboristan ŝtaton, ŝtaton kiu estus

la preparilo por mondo senŝtata kaj harmonia (t.e. anarkia). Ĉar ili ekkomprenis ke la homoj ne emas simple subite ekkompreni ke ilia ideologio estas la ĝusta, do pro tio, por ilia bono ni devas uzi ĉiajn mediojn por ilin konvinki pri tio.

Sed eĉ tiam, se oni altrudas, oni ne altrudas ideologion puran, oni aliformigas perforte la vivon de la personoj ĝis kiam ili alikutimiĝas al tiu nova stato, sed, fakte kiu ŝanĝiĝis ne estas la ideologio en iliaj kapoj, nur ŝanĝiĝis la kulturo, la aro da simboloj kiu donas signifon al la socia vivo. Kaj ili akiris per tio, ne samideanojn, socialismo-ŝtatanojn. Kaj la origina celo, enputofunden. Ili sukcesis tute aliformigi la vivon de la personoj, sed ne laŭ tio kion ili celis komence.

Ideologio havas tiun econ: malsamaj personoj havas malsamajn ideologiojn.

Tamen, se ni parolas pri kulturo, tiu aserto ne validas. Tuta nacio povas paroli la portugalan,

\* Ideologioj, filozofio, scienco, fakte ankaŭ estas kultureroj, sed en alia nivelo, Esperanto estas kulturo en la plej baza nivelo, kiel la gestaro de popolo.

preskaŭ tuta mondo povas uzi saman ilon por ŝanĝi varojn: mono, uzado de vestaĵoj estas tre populara afero, la plejmulto aŭdas ian muzikon. Krom tio, eĉ kiam ne estas unuanimeco, ĝenerale estas pli da kunvivebleco: studado de filozofio estas parto de homa kulturo; ne ĉiuj ĝin praktikas, sed la plejmulto ne kontraŭstaras.

Kaj tia estas Esperanto, tia kia mono, tia kia libro, tia kia kutimo manĝi je tagmezo, ĝi estas ero de kulturo. Oni povas ĝin praktiki, sen ĝin kredi, oni povas ĝin uzi, sen koni ĝian historion, oni povas forgesi ke ĝi estas parto de kulturo, kaj uzi ĝin kvazaŭ ĝi estus pli natura ol pomoj (ofte ni forgesas ke kelkaj aferoj ne estas naturaj, estas kulturaj, ekzemple la bongustaj lango-kisoj: ne ĉiuj kulturoj ilin havas, kaj ties signifo ege ŝanĝiĝas de unu kulturo al alia, de erao al erao). Pro tio, vere Esperanto estas afero kiu havas la potencialon esti vasta tra ĉiuj anguloj de la tero, ĉar ĝi ne estas ideologio, ĝi estas simpla kulturero.

Mi povas ĝin uzi por ami, por baki panojn, por plani kaj konstrui raketon al la luno. Mi povas uzi Esperanton por fiparoli pri Zamenhof, por fiparoli pri Esperanto, por danci tangon, por laŭdi la belecon de Esperanto, por plani murdon kaj por batali kontraŭ Esperanto. Kaj tio estas unu el la plej belaj aferoj de ĝi, malsimile al aliaj movadoj, ideologiaj, en kiuj oni trovas pli grandan anonon ĉe junuloj, aŭ ĉe virinoj, en Esperanto ĉiuj aĝoj ĉeestas, dekstruloj kaj maldekstruloj, fihomoj kaj malfihomoj, komunistoj kaj katolikistoj, beboj kaj

drinkemuloj.

Pro tio, kaj aliaj aferoj, mi amas Esperanton. Fakte ekzistas, aparte de Esperanto, esperanta ideologio, verda ismo, kaj tiu ismo multe respondecas pri la nuna disvastiĝo de ĝi. Sed, ĉiuj komprenu ke se Esperanto volas esti la dua lingvo de la mondo ĝi ne povas esti posedaĵo de tiu ideologio (kiun mi ne komdamnas, mi eĉ konsentas multe pri ĝi). Mi ripetu, se Esperanto estos tutmonda, ĝi estos ĉar la homoj simple ĝin uzos, kaj ĝi nur povas iĝi tia ĉar ĝi ne estas ideologio, estas kulturo.

Mi eĉ riskas aserti, ke se ni denove klopodos tro disvastigi ĝin per la ideologio, ni eĉ malhelpos la disvastigadon trans certan nombron kaj certajn mediojn. Ĉi tio ne estas raŭmista nek finvenkista sinteno, ĝi estas mia persona konkludo, de mia sperto, de mia kono, tute partia (homoj estas partiaj). Ĝi certaforme reunuigemas tiujn sintenojn: por ke raŭmisto pli bone ĝuu esperantan etoson li multe gajnas kontribuante al ĝi, se finvenkisto volas vere diskonigi plu esperanton li devas iom ĉesi prelegi kaj vigligi la esperantan kulturon, ekuzante kaj ekuzigante ĝin.

Ni devas instrui Esperanton laŭ tio, ke ĝi tuj ekhavu sencon por la vivo de la lernanto, por ke ĝi, la lernanto, tuj ekuzu la lingvon, por ke ĝi tuj profitu la esperantan etoson. Se ne, ĉio iĝas senseca, tenata de nur morala apogo. Morala apogo bonas, sed ni volas pli, ni volas ke pluraj partoj de la homo ĝuu esperanton, ni volas ke la homoj studu esperante, ke la homoj amikumu

## JoMo

*JoMo rakontas iom pri sia vivo kaj pri sia sperto en Brazilo dum memorinda kongreso en Campinas. Kiam li koncertis kaj kongreseje kaj kurbodome.*

Renata Ventura intervjuis per retroŝto.



### Momenton!

**Kiuj estas viaj impresoj pri la Brazila Kongreso en Campinas, SP?**

### JoMo

Kongresoj estas ĉiam emociplenaj momentoj: malnovaj amikoj renkontiĝas, novajn amikojn vi ekkonas, ktp. En tiu senco, la kongreso de Kampino estis kiel kutime kaj mi revenis kun plena valizo de agrablaj travivaĵoj, eĉ se mi nur vidis parton de la aranĝo. Mi revidis amikojn, kiujn mi ekkonis en Finnlando antaŭ unu jaro (Roger, Rogener, Alejandro) kaj malkovris la brazilan movadon. La etoso estis bonega kaj la organizado pli bona ol tio, kion oni povas atendi de latinida lando ;-).

La renkontiĝo inter artistoj kaj publiko estis bonega kaj malkutima ideo.

Pri la festoj, mi partoprenis unu iomete improvizan, dum kiu estis surmomenta bando

de diversaj muzikistoj. Estis bonege kaj eĉ iam la etoso iĝis frenezuma kaj rokenrolega!

La akceptado komenciĝis la unuan matenon iomete pli malfrue ol antaŭvidite (ĉefe se mi komparas kun germanaj aranĝoj!), sed dum tiu tempo la homoj kisis, brakumis kaj estis gajaj, do tute ne gravas.

Tamen iomete surprizis min la spirita (ne nur spiritisma) etoso de la kongreso, kiu estas malpli kutima en Eŭropo, sed mi pensas, ke tio devas esti spegulo de la brazila socio. Estis kelkaj eroj de programo pri religio kaj preĝado, kiuj estas por mi malkutimaj. Sed ankaŭ aliflanke en Brazilo mi malkovris, ke estas multaj liberecanoj. Bunta socio.

### Momenton!

**Kiom da Esperantaj kongresoj vi jam partoprenis?**

### JoMo

Oj oj oj! Tre malfacile diri. Mi kalkulis, ke almenaŭ sendube 30, sed mi certe eraris kaj mankas kelkaj, do oficiale inter 30 kaj 40. Mi ne povas esti pli preciza pro malforteco de mia memoro (pro granda aĝo!).

Ĝenerale mi ludas esperante (tio signifas por esperanta publiko) kvin aŭ ses fojojn dum la jaro.

### Momenton!

**Temo: muzikumante esperante.**

### JoMo

Fakte, mi estas muzikisto antaŭ ol esti esperantisto, pli precize mi koncertis la unuan fojon en 1978 kaj esperantiĝis en 1988. Mi komencis

tute nature muzikumi esperante kaj samtempe lerni la lingvon. Mi bone memoras, ke la vorto “hejmen” sonis al mi kiel la angla “hey, man” kaj ŝajnis sufiĉe rokenrola. La unua kanton, kiun mi komponis kaj verkis en esperanto nomiĝas do “Hejmen”. Mi neniam ludis ĝin sur scenejo nek surbendigis. Mi pensas, ke ĝi estas

sufiĉe fuŝa.

Ĝenerale mi koncertas multlingve por esperanta aŭ neesperanta publiko. Por mi estas bona ebleco prezenti lingvon internacian al “krokodiloj” per maloficiala kaj distra maniero. Mi ne rakontas tro profunde pri kio temas, sed almenaŭ la homoj aŭdas la nomon, vidas ke ĝi ekzistas kaj aŭdas ke oni povas kanti per ĝi.

Dum Esperantaj koncertoj, mi ĝenerale kantas en pli ol dek lingvoj; mi estas tro mallaborema por povi kalkuli precize kiom da. Estas tri specoj de kantoj: kelkajn mi konas en du versioj: esperanta kaj krokodila. Mi kantas ilin esperante dum renkontiĝoj. Kelkaj havas nur esperantan tekston kaj aliaj nur malesperantan. Tiuj neniam ŝanĝiĝas. Mi povas aldoni kvaran

“*Pri la festoj, mi partoprenis unu iomete improvizan, dum kiu estis surmomenta bando de diversaj muzikistoj.*”



la 25-an de Septembro de 2006

Rafael Lins

*pri viroj kies sentoj agonias en la dezerto  
de l' memoro*

Senparole mi restas

Sombre

Rezignacie sen amoj

nek aplaŭdoj

Mi padas la vojon de l'inerto

(jes, subkonscie mi ploras

kaj ridas

kaj eĉ sukcesas

fojfoje

verki poemojn)

Survoje al soleco

ĉiuj nostalgioj

estas pravaj

specon: kanzonoj kies tekston mi forgesas sur la scenejo!

Delonge oni min taksas malkutima kaj malserioza ulo. Kiam mi estis studento, mi lernis la parolatan araban lingvon kaj la serbokroatan. Do, aŭdi ke mi kantas esperante ne surprizis iun. Multaj homoj pensis; “Oj, tiu jOmO, kia amuzigulo, mi ne scias de kie li prenas tiajn ideojn.” Kaj poste estis ofte okazo por paroli pri Esperanto kaj klarigi al aliaj, ke estas tute serioza afero.

### Momenton!

**Ĉu vi trovis malfacilaĵojn kiam vi decidis muzikumi esperante?**

#### JoMo

Tute ne, tute ne, tute ne! En tiu tempo mi ludis kun grupo “Rozmariaj Beboj”, kaj mi jam estis respondeculo de la “lingva fako” de la grupo. Tio signifas, ke ni volis kanti en multaj lingvoj por montri nian sennaciecon kaj translimemon. Esperanto iĝis la plej grava lingvo inter la ne-francaj lingvoj, pro tio, ke ĝi enhavas tiujn ideojn. Ankaŭ politike ĝi estis iam uzata de la liberecana movado, kaj ni volis montri, ke ni estas idoj de ĝi. Ankaŭ la leitmotivo de la bando estis “fari ĉion, kion la aliaj ankoraŭ ne faris”, kaj pro tio, la aliaj anoj de la grupo kun ĝojo akceptis Esperanton. Sur nia unua albumo (kiu estis tutfrancie vendita) aperas unu kanto je du versioj: franca kaj esperanto, kiel “bonus track” aŭ “plia peco”. La rekantaĵo tamen estas en la jida lingvo.

Mia unua koncerto en Esperanto estis dum JJoKo 1989 en urbo Kerkrade en Nederlando. Mi ankoraŭ malmulte scipovis la lingvon, sed ne tute gravis. La rezulto estis amuza por spektantoj (mi esperas). Mi ofte eraris (“Saluton karaj geamikoj kaj geamikinoj !”) sed parte ankaŭ volonte. Mi demandis konsilojn de traduko el la scenejo al Aline Boulet, kiu tiam estis prezidantino de Junaj Esperantistoj de Francio kaj sidis je la unua vico de la publiko. Mia vestaĵo estis tiu de mia rokbando “Rozmariaj Beboj”, tio signifas, ke mi vestis kiel juna lerneano de la jaroj 1940, kun bereto sur la kapo, mallongaj pantalonoj kaj enormaj ŝuoj. La anekdoto plej notinda estas, ke dekstre en la publiko staris unu bela juna polino (pleonasmo), kiu poste iĝis mia edzino. Ni ambaŭ bone kaj emocie memoras tiun momenton, kompreneble.

### Momenton!

**Kiu “lanĉis” vin en la esperantan scenon?**

#### JoMo

La persono, kiu min pensigis ludi esperante estas Floreal Martorell, kiun ĉiuj nun konas kiel aganto de Vinilkosmo, la diskeldonejo. En tiu tempo (1988), li nur komencis lanĉi la ideon, ke oni povas muzikumi esperante kaj profesie. Delonge li estis en la muzika medio de Tuluzo, partoprenis rokgazeton, radio-elsendojn kaj starigante provludejojn por la lokaj grupoj (tio ĝenerale kruele mankas al muzikistoj). Multaj homoj povas esti ege dankemaj al li pro la laboro, kiun li faras. Mi estas unu el tiuj homoj.

### Momenton!

**Ĉu vi havas amuzan anekdoton pri io ajn rilate al Esperantio?**

#### JoMo

En Irlando ni loĝis per Pasporta Servo kelkajn tagojn ĉe afabla esperantisto (alia pleonasmo), kiun ... ni tute ne vidis. Li telefone indikis kaŝejon de la ŝlosilo kaj estis for de domo. Ne estas amuze, sed povus esti temo de romano, ĉu ne? Krom tio, en la vilaĝo dum promeno, la homoj salutis nin korvarme tiel, kvazaŭ ni estus vilaĝanoj, kiujn ili konas de ĉiam.

Dum KEF 2005 en Helsinko, mi iris buse al flughaveno por preni nian drumiston, kiu alvenis aviadile. Atendante revenbuson, en vico, antaŭ ni staris junulo kun folio en la mano printita de interreto kun indikoj. Mi pensis, ke eble li estas esperantisto. Sed la problemo estis, ke nia drumisto ne estas, do mi ne povis paroli esperante por vidi, ĉu la alia persono reagos. Bonŝance, nia drumisto konas almenaŭ la vorton “amasloĝejo”, kaj mi uzis tiun vorton en franca frazo, kaj la junulo turniĝis al ni. Estis Roger (Borges) de Brazilo. Nuntempe ni havas komunan projekton pri verkado de kodisko.



## Man-ĉe-mane

Carlos Drummond de Andrade  
tradukita de Rafael Lins

Mi ne estos poeto de mondo kaduka.  
Mi ankaŭ ne kantas la mondon estontan.  
Mi ligiĝas al vivo kaj rigardas miajn kamaradojn.  
Ili silentemas sed nutras grandajn esperojn.  
Inter ili, min impresas la enorma realo.  
La nuno tiom grandas, ni ne fordisiru.  
Ni ne tro fordisiru, ni iru man-ĉe-mane

Mi ne estos kantanto pri virino, pri rakonto,  
mi ne mencios suspirojn je vesperiĝo, pejzaĝon  
[videblan tra fenestro,  
mi ne disdonos dormodrogojn nek leterojn de  
[memmortiginto,  
mi ne fuĝos al la insuloj nek estos kaptita  
[de serafoj.

La tempo estas mia objekto, la tempo  
[ĉi-estanta, la homoj ĉi-estantaj,  
la vivo ĉi-estanta.

## Foto-mozaiko

*Ĉi tie tie ni publikigas hazardajn fotojn senditajn de niaj legantoj. Se vi havas ridindan, ĝuigan aŭ interesan kaj prikomentindan foton sendu ĝin al ni por la venonta Momenton! momenton@gmail.com.*



**Rafael H. Zerbetto sendis kaj komentis:**

*Kristo: la polino Irmina Szustak partoprenis BKE en Rio kaj faris tipan turistan foton antaŭ la plej fama brazila vidindaĵo.*



**Tatiana Pacioni sendis kaj komentis:**

*La tago kiam mi ekkonis Akonkagvojn – magia loko.*



**Rafael H. Z. sendis kaj Lucas Vignoli komentis:**

*Avo-ĉemizulo kaj nepo-ĉemizulo, dum kampanjo por la lingva revolucio, vestantaj ĉemizoj kun la famega foto de Zamenvara.*



**Tsukuru sendis kaj komentis:**

*En la 41-a BKE en Rio kun Ricardo, Neuza kaj Aurelio.*



**Rafael H. Zerbetto sendis kaj komentis:**  
*Kopianta Supernova: ...sed Vinilkosmo ne volas fari la KD-on de la muzikgrupo Supermalnova.*



**Cintia Elena sendis kaj komentis:**  
*Trinkanta akvon kian birdo ne trinkas.*



**Lucas Vignoli "sendis" kaj komentis:**  
*En Rio, en la sekurega tramo de Santa Teresa, pli radikala ol iu ajn amuzo-parko. Irmina, Ines, Leandro kaj Raoni ŝajne ĝuegis ĉion.*

## Tielas Viv' – Kore

*17 Titoloj – 60 min + 2 mp3-dosieroj + video + 15 karaokeaj dosieroj. Vinilkosmo, 2007.*

Rogener Pavinski


La grupo Kore el Francio reaperas kodiske post 5 jaroj ekde sia unua albumo "Kia viv" (2002). Tiam la grupo impresis pro la bela kaj profesia registrado de la rokmuzikaj kantoj. Elstaris frapa gitaro kaj rafinita voĉo de la kantisto Kris Sptizer.

Post longa paŭzo, la bando disiĝis, kaj Kris, trovinte partneran muzikiston, ekverkis por nova albumo – Tielas Viv' aperis en 2007.

Je la unua kanto, jen eksonas tre ritma kaj kaj eĉ danciga muziko, impresas la denove trafa miskio inter la instrumentoj. Tuj rimarkeblas ke la stilo rokmuzika perdiĝis, kaj donis spacon al iom latineca muzikeco – Ŝanĝo certe ŝuldita al "Fiks", kiu kune komponis.

Kelkaj pecoj estas iom similaj unu la alian, kun kelkaj interesaj esceptoj kiel "Pro mi", en kiu sentiĝas iom da vervo de la malnova Kore. En "Promeso via" Kris montras alian karakteron, per malrapida kanto akompanata de piano.

Teksto-kajero venas kun francaj kaj angla-lingvaj etaj klarigoj pri la tekstoj, sed estas iom



tre kolorigita kaj foje ne taŭgaj liter-tipoj. La tekstoj plejparte parolas pri amo, kaj foje tuŝas temojn de la antaŭa albumo, kvazaŭ "tielas viv" estas daŭrigo de "kia viv" eĉ post 5 jaroj.

Kaj por reliefigi tiun senton, la disko havas "Parton 2", t.e. malnovaj muzikaĵoj de malnova kore, kiuj antaŭe ne estis lanĉitaj, aperas sur la disko. Do eblas havi samtempe tiujn du "fazojn" de la grupo. La rokmuzika flako montriĝas per 6 trakoj, el kiuj, "Drag Queen" kaj "Nova Viv" estas jam konataj per la Interreto.

Ĉu ne sufiĉe bunta disko? Sed, kiel aldonajo, ankoraŭ estas 2 mp3-kantoj, unu en franca lingvo, karaokeaj versioj de 16 titoloj mp3-formaj, videofilmo de Kore en la studio kaj versio de "the show must go on" de Queen, nomita "mi brilu plu".

Ĉu vi plej ŝatos la unuan aŭ duan parton, aŭ eĉ la ekstraĵojn, mi ne scias.

Sed el tiu duflanka albumo, vi certe elektos vian preferatan.



## BEJO-Ataŝeo relanĉita, partoprenu ĉi-jare!

Danke al la apogo de Oomoto kaj al la apogo de pluraj anonimaj donacintoj, ĉi-jare la konkurso BEJO-Ataŝeo denove okazos. Tiu ĉi novaĵo estas prifestinda!

Nun vi, BEJO-ano havas denove la ŝancon ekhavi vojaĝbiletojn al Eŭropo, kaj reprezentivan kulturon en la malnova (ĉu mezepoka?) kontinento. Sufiĉas ke vi verku monografion pri la ĉi-jara temo (ĉu vi scivolemas? Aliru la retpaĝon de BEJO kaj tie legu la regularon de la konkurso, [bejo.esperanto.org.br](http://bejo.esperanto.org.br)), sendu ĝin al BEJO ĝis la limdato kaj prezentu vian monografion en prelego (aŭ en la kongreso de Fortaleza aŭ per sendo de video).

En tiu vojaĝo la junulo ekkonos Esperantion ege bone, krom tio, akiros senfinvaloran sperton transkulturan kaj ekhavas superrigardon pri nia movado – estiĝante fakulo pri ĝi. Foliumu ankoraŭ en ĉi-revuo la foto-albumeton pri la vojaĝo de la pasintabejo-Ataŝeo.

La regularo de la konkurso troviĝas en:

<http://bejo.esperanto.org.br/>

Ĉu vi volas helpi tiun konkurson okazi pli ofte kaj pli vigle? Nun facile eblas donaci rekte al ĝi: kiam vi aliĝos al BEJO aŭ BEL aldonu donacon por “Fundo Juventude”.

## Vojaĝeroj

*Eroj de la zigzago de BEJO-Ataŝeo en Eŭropo, prikomentitaj.*

Lucas Vignoli Reis

Jen mia devigata artikolo (en la regularo de la konkurso estas inkluzivita regulo, laŭ kiu la venkinto devos verki almenaŭ du raportojn, por Momenton! kaj por Brazila Esperantisto).

Tamen estas por mi granda plezuro verketi pri ĉi tiu kara vojaĝo. Mi volis sukcesi esprimi vorte ĉion (nu, bone, preskaŭ ĉion) kion mi travivis en tiuj memorindaj ses monatoj. Ne eblas, tute ne, do mi kontentiĝas montrante al vi eretojn (fakte, fotojn) de la freneza vojaĝego. Kaj mi esperos ke via imagemo plenumu la ceteron de mia tasko.

Superrigardon: entute mi vizitis ĉirkaŭ 40 urbojn, (mi revizitis plurfoje ankaŭ kelkajn), prelegis ĉirkaŭ 40-foje, kaj okazigis 20 alispecajn aktivaĵojn en tiu tempo. Nun rigardante la pasinton, mi pensas: kia troigo! Mia unua konsilo al la venonta ataŝeo: “Prelegu malmulte, veturu malmulte”. Kaj mi nur finpretigis ĉiujn prelegojn, la 4-an monaton (alia troigo).

Tamen, mi diras, ĉio valoregis, ĉio indegis, mi ne farus alimaniere. Esti sola en fremda kontinento estis por mi sperto senfina.



### Silento eksterordinara

*De vigla, brua kaj somera Rio al vintra kaj silenta Amsterdamo. Ege min trafis la silento de pluraj publikaj lokoj de Eŭropo. Por mi ne imagebla, trajno plena: silenta, stacidomo: silenta.*

### Soleco kontempla

*Kelkfoje, malgraŭ tio ke ĉiam mi estis ĉiĉeronata aŭ albabelata, kelkfoje mi troviĝis sola, mi ĝuis kontempli pejzaĝon, personojn kaj min mem.*





### Internacia Seminario kaj aliaj E-eventoj

Mi tuj alvenis en esperantan eventon, kaj bonŝance en la plej bonan kiun mi travivis, IS, vintra, novjara renkontiĝo. En IS oni malĉeestas la prelegojn kaj traĉeeestas la vesperan kaj la noktan programon, tiu lasta havas dancejon kun DJ-oj (inter aliaj nia kara Roĝer), drinkegejon kaj gufujon (kandelluma flustro-kaj-te-ĉambro).

Tiu IS okazis ene de germana mezepoka kastelo, mezvintre, la evento okazas plejparte ene de la loko, kie varmas. Notinde: tiu ĉi kastelo estis sidejo de nazisma SS kaj inspiris la unuan 3D-videoludon: "Castle Wolfenstein".

Belege eltrovi la viglan kaj malkrokodilan eŭropan junularo, ekhavi amikojn, ktp.

Krom IS, mi partoprenis germanan PSI (Printempa Semajno Internacia), italan IJF (Internacia Junulara Festivalo), italan HEL (Humura Esperanta Libera Aranĝo), nederlandan PRN (Primitiva Renkontiĝo en Nederlando) kaj italan Arci-Esperanto-eventon.

### Solidaraj samideanoj

Mi havas multon por danki al la esperantistaro. Ĉie oni gastigis min tre lukse kaj multaj eĉ plezure min ĉiĉeronis tra la urbo. Ĉiuj ege min helpis kiam mi havis problemojn, cedis komputilon por ke mi plenumu miajn taskojn, helpis al mi organizi la vojaĝon ktp. Koran dankon al ĉiuj, ili tiel multas ke ĝis nun, sesmonaton poste mi ankoraŭ ne sukcesis bone danki ĉiujn.

Kien ajn mi iris mi sentis ke mi ekhavis amikon sinceran, ĉu estu ĝi miaaĝa ĉu pli maljuna junulo. Kelkfoje mi pensas ke mia koro eksplodos pro ĉi vojaĝo, ĉar tiom multaj ekloĝis miakore.

Mi eĉ trovis duan familion, kiam mi vizitis Anetan en ŝia antaŭa vivurbo. Ŝi tuj diris al mi: "se io misokazos tuj revenu ĉi-tien", kaj tiel estis, Aldona, Aneta kaj Grażyna ĉiam estis tie, ĉi-familio estis mia sekura haveno. Kaj mi bezonis, kiam mi estis freneziĝonta, tien mi iris kaj tie ili kore min akceptis.



### BEJO-Ataŝeo 1 1/2

En tiu epoko granda amiko mia estis studanta en Lille, Francio, do, ni profitis la okazon por tra-vivi kelkajn aferojn kune kaj pribabili pri niaj spertoj.

LI lernis Esperanton en IS, kaj ni eĉ faris skeĉon kune por ties arta vespero. Ni renkontiĝis en IS, Lille, en Weil am Rhein, en Stuttgart, en pola HEL, en Svedio (kie ni plaĝumis), en Varsovio kaj en Krakovo.


Li estas tiu ulo super mi en tiu foto supra, kaj li nomiĝas João (mi klopodis konvinki lin verki kolumnon por ĉi-Momenton!, tamen, vane, eble venonteldone).



### Stelaj Renkontiĝoj

Mi havis kelkajn stelajn renkontiĝojn, estis kvazaŭ mi estus rekoninta ilin. Mi ne havas vortojn por priskribi tiajn renkontiĝojn, do, vi mem imagu. Inter aliaj kosmaj renkontitoj supre troviĝas Aneta, Max (kun kiu de du jaroj mi korespondadis), Oleg kaj Yo.





### Historiaj lokoj

*Krom renkonti personojn kaj amikumi, kompreneble mi profitis la okazon por ekkoni multajn historiajn ejojn. Estis ege interese koni la originon de pluraj aferoj kaj gapi plurajn historiajn trezorojn de Eŭropo.*

*Surpaŝi miljarajn trotuarŝtonojn, bicikli sur antikva romia vojo (surfote), spekti meson en Vaticano (surfote), miri plurajn renasencajn kaj aliepokajn preĝejojn (surfote), vidi romian militestron uzi poŝan telefonon (surfote), kaj viziti ĉiaspecan faman kaj nefaman vidindaĵon, kiel Moulin Rouge (surfote), la turo Eiffel, la katedralo de Köln, la tombo de Aŭgusto, pluraj tomboj kaj tombejoj. Viziti vilaĝetojn, observi la arkiteturon, la signo-ŝildojn, ...*


*Kelkfoje mi pensas ke ĉi-historio pezegas sur la ŝultroj de la Eŭropanoj.*



### Laboro

*Mi prelegis, prelegis kaj prelegis, ĉefe pri Brazila Muziko. Ĝenerale oni interesiĝis pri la prelego, kaj la plejmulto min rigardis gape kiam mi asertis tion, ke sambo estas trista muziko.*

*Unufoje mi eĉ gvidis esperante kaj dancigis "Quadrilha" al poloj kiuj multe ĝojis kaj surpriziĝis pri kiel ĉi-danco varmigas la korpon. Troviĝas en interreto video pri tio. (Ĝis nun mi ne havis tempon serĉi tiun disan materialon).*



### Aventuro

*Dum la vojaĝo mi pretervivis plurajn aventurojn. Ĉie kie mi trovis maron mi enakviĝis, eĉ vintre en la mediteranea maro, jen foto de mia mempretigo en la maldekstrosupra angulo, kaj en Svedio somere, kie la suno nur malaperas je la 22-a vespere. En Italio finvintre en alternativa ejo mi baniĝis ekstere per siteloj. Kaj multajn aliajn aventurojn mi travivis.*

*Tamen la plej radikala aventuro sendube estis trajnumi: mi zigzagis freneze (vidu dekstre) kaj mallogike, mi pensas ke se mi sumos la tuton de la entrajna tempo, la rezulto estos tuta monato.*

### Danko, sperto kaj volo

*Sed post tiom longa vojaĝo restis al mi dankemo, sperto kaj volo fari ion per tiu ĉi sperto. Se mi devus resumi mian sperton per unusola bildo, tiu estus ĉi-lasta maldekstra bildo.*



## Zigzago de BEJO-Ataŝeo 2007



São Paulo – Amsterdam – Milano – Wewelsburg (Paderborn) – Amsterdam – Lille – Barcelona – Weil am Rhein – Zürich – Weil am Rhein – Toulouse – Lille – Herzberg am Harz – Lund (Svedio) – Kopenhago – Lund – Weil am Rhein – Stuttgart – Weil am Rhein – Milano – Cupramontana – Trieste – Milano – Bonn – Essen – Duisburg – Bonn – Milano – Lignano Sabbiadoro – Treviso – Vicenza – Venezia – Firenze – Bologna – Torino – Milano – Hel (Pollando) – Varsovio – Ancona (Italio) – Cupramontana – Narni – Roma – Eindhoven (Nederlando) – Den Dolder – Paris – Berlin – Hamburg – Bonn – München – Duisburg – Rotterdam – Lund – Krakovo (Pollando) – Varsovio – Lodz – Graz – Zürich – Weil am Rhein – Milano – Amsterdam – São Paulo

\* Ĉi-priskribo supra ne estas absolute preciza.



# Anoncu ĉi-tie

momenton@gmail.com

Verku ion kaj sendu.  
Ni bezonas viajn  
artikolojn kaj fotojn.

momenton@gmail.com

## **BEJK 2008 – Fortaleza Participe!!!**

**Doe para o Fundo  
Juventude e ajude  
a acontecer o concurso  
BEJO-Ataŝeo**

basta mandar um aliĝilo  
ao escritório central preenchendo  
o item doações, Fundo Juventude.

**Participe do concurso  
BEJO-Ataŝeo e concorrea  
a uma viagem à Europa**

Detalhes no interior da revista.

**Gostou do arranjo  
gráfico desta revista?**

ele foi feito por designers  
do escritório “Preface design”.  
contato@preface.com